# LA PERMANENTA REVOLUCIO

ORGANO DE LA
BOLSEVISTOJ-
LENINISTOJ.
PROPAGANDAS LA
IV-AN INTERNACION
SOLA TEORIA MARKSISMA

ORGANO EN ESPERANTO.

ANSVARHAVENDE Aage Kjeldsö. Helsingör, Danmark. TRYK Sv. Johannsen, Kbh.
PREZO 0,20 dkr. por unu kajero, APERAS monate, ABONO por 1 jaro 2,40 kr.
EDITITA de la Propaganda Komitato de Leviĝu, konsente de I.K.L.
ADRESO Svend Johannsen, Danio, Kopenhago, Australiensvej 24. (Esperanto)

KVARA KAJERO.........UNUA EDITO..........KOPENHAGO.........1936

EL LA ENHAVO

LA KVARA INTERNACIO K LA MILITO
unua parto, antaûparolo, prologo, enkonduko, preparo al la nova milito, USSR k la imperiisma milito, la nacia defendo
LA SEPA MONDKONGRESO DE KOMINTERNO
unua artikolo - la popolfronto en Francio.
LA PROLETARO K LA SANKCIOJ
rezolucio de la marista sindikato en Nov-Zelando.
SENNACIISMO AÛ MARKSISMO?
recenzo pri la plej nova broŝuro de la sennaciistoj - "Ĉu so[c]ialismo konstruiĝas en Sovetio?"

KAJ ALIAJ.

PROLETOJ ĈIULANDAJ, UNUIĜU!

PROLOGO .

Ĉi tie ni prezentas al la esperantistaro la primilitajn tezojn de la Internacia komunista ligo. Nun, kiam jam komencis la milito en Abisenio kiam la stalinistoj malkaŝe preparas perfidon similan al tiu en la aŭgusto de 1914 estas la tezoj duoble gravaj.

Kopenhago, 12-12-35 / P.K. de Leviĝu

ANTAŬPAROLO.

Ĉi tiuj tezoj aperas en tempo kiam la militdanĝero en Eŭropo ĉiam pligrandiĝas. La "malarmigkonferenco" fariĝas al areno por plua formado de militligoj. Mussolini k ĝeneralo Weygand alvokas por pliarmigo. Hieraŭ Aŭstrio, hodiaŭ Manĉukuo k la Saardistrikto estas la fokusoj de la militdanĝero k estonta mondmasakro. Tutmonde oni nur parolas pri aermobiligo, pligrandigo de aer- k marflodoj, kemimilito, mobiligo de la industrio ktp.
La militdanĝero apportas por ni grandegajn devojn k respondumon. Unue la devo prepari k organizi la batalon kontraŭ la milito, devo estante des pli grave ĉar la Dua k Tria internacioj nur estas bremsoj en la kontraŭmilita batalo.
La naciismaj gvidantoj de la Dua internacio sin ree preparas liveri al la imperiistoj la homan militmaterialon de la venonta milito.
La gvidantoj de la senforta Tria internacio misgvidas la popolon anstataŭigante la batalon kontraŭ la milito per bruaj ŝajn gravaj kongresoj.
La kontraŭmilita batalo devas esti gvidata kontraŭ la du internacioj k spite de ili. Al ĉi tiu batalo estas donenda nova bazo, nova fundo - ĉi tiu de la Kvara internacio. Se ankaŭ la kadroj de la Kvara internacio estas nur malmultmembraj, La ĝusteco k klareco de ilia politiko k ilia energio al plio ebligos ludi maldubigantan rolon. Ni memoras je Karl Liebknecht k Rosa Luksemburg!
La problemo pri la imperiisma militok ĝia preparo estas la centra problemo de niaj tagoj. La batalo kontraŭ la imperiisma milito staras en la mezpunkto de la diferenciĝprocezo de la proleta klaso. La karaktero de la reformismaj k centrismaj organizoj pere de ili senlarviĝos sed la kadroj de la bolŝevistoj-leninistoj per de ili plifortiĝos.
Nur tiuj kamaradoj kiuj severe k serioze kritike studadas ĉi tiujn tezojn estas sufiĉe armitaj por la politika laboro kontraŭ la milito. Sed studado, diskutado, kritikado al la tezoj - kiel utila tio estas - ne sufiĉas. La batalo decidos! Dum la ĉiutaga klasbatalo necesas batali en la senco de ĉi tiuj tezoj, en la spirito de la nepraranta revolucia internaciismo, en la spirito de Lenin!
En ĉi tiu senco ni transdonas la tezojn kiuj estas edititaj kiel skizo jam en la Januaro de 1934 en nia gazeto "Problèmes et discussions" franclingve post multaj ŝanĝoj k plibonigoj al la proleta publiko.
Genevo, je la deka de junio de 1934

La sekretariaro tutmonda. (IS-IKL)

ENKONDUKO.

La katastrofa komerc-, industri-, agrar-, k financkrizo, la detruado al la internaciaj komercaj interrilatoj, la marasmo de la produktivaj fortoj de la socio, la neeltenebla pliakrigado al la klasdiferencoj k de la internaciaj diferencoj tute konfirmas la karakterizon de Lenin pri nia epoko kiel epoko de militoj k revolucioj.
La milito de 1914-18 enkondukis novan epokon kies plej gravaj politikaj okazoj estas la konkero al la ŝtato per la rusa proletaro 1917, k la venko pri la germania proletaro 1933. La terura mizero de la popoloj en ĉiuj kontinentoj k la pli teruraj danĝeroj kiujn kaŝas la morgaŭa tago estas la rezulto de ke la revolucio de 1917 ne trovis triumfan ekspansion sur la eŭropa k monda areno.
En la diversaj landoj aperas la historia misvojo de la kapitalismo kiel senlaboreco, malplialtiĝo de la vivindekso de la laboristoj, proletiĝo de la kamparistoj, k urbaj etburĝoj, la fisiĝo de la parlamenta ŝtato, terura venenado al la popolo per "sociaj" k "nacia" reformoj en vera forigo al la sociaj reformoj, la anstataŭigo de la malnovaj

regadaparatoj per la senmaska militistar-k pólicaparato(la bonapartismoj de la kapitalisma finepoko),la pligrandiĝo de la faŝismo k ties ekregado,k la forigo al ĉiu proleta organizo.La samaj procezoj forigas sur la monda areno la restojn de la internaciaj rilatoj,pliakrigas ĉiun interŝtatan konflikton,vidigas la senhelpecon de la pacifismaj solvprovoj,aperigas novan pliarmigadon k tiel kondukas al la nova imperiisma milito.La faŝismo estas ĝia plej konsekvenca preparanto k organizanto. Sed aliflanke la apero de la tute reakcia misformo de la hodiaŭa kapitalismo,la fino de la demokratio,reformismo k pacifismo estigas la neprokraŝtigeblan neceson por la proletaro trovi helpan vojon el la nehaltigebla katastrofo k por la revolucio.Nur la faligo al la burĝaro per la proletaro leviĝanta povas savi la homaron antaŭ la nova ĉion estinganta hommortigado.

LA PREPARO AL LA NOVA MILITO.

1.La kaŭzoj aperigintaj la lastan imperiisman militon nun atingis pli grandan,nekompreneble jam akrecon ol meze de 1914,k estas nedisigeblaj de la nuna kapitalismo.La timo je la sekvoj de nova milito estas la sol faktoro retenanta la volon de la imperiistoj.Sed la povo de ĉi tiu bremso estas limigita.La akreco de la internaj antagonismoj faŝismigas unu landon post la alian,kiuj siaflanke nur povas resti per preparo al novaj internaciaj eksplodoj.Ĉiuj registaroj timas la militon.Sed neniu registaro povas libere elekti.Sen la próleta revolucio estas nova mondmilito nehaltigebla.

2.Eŭropo,antaŭ nelonge areno de la plej granda de ĉiuj militoj ŝanceliĝas ĉar pesila de venkintoj k malvenkintoj al la nova milito.La Ligo de nacioj,kiu laŭ la oficiala programo devus"organizo la pacon",sed envere devas eternigi la sistemon de Versajles,k neŭtrigi la hegemonion de Usono,k formigi ŝirmmuron kontraŭ la ruĝa oriento,ne povis kontraŭs stari la imperiismajn antagonismojn.Nur la plej cinikaj de ĉiuj social-patriotoj provas ligi kun la Ligo de nacioj ideojn pri malarmigado k paco.Vere la Lige de nacioj fariĝis al subordigita figuro sur la ŝakbreto de la imperiismaj kombinadoj.La diplomatia ĉeflaboro,evitanta Geneevon,konsistas el serĉado al militkunulo,t.e.en rapida preparo al nova masakro.Samtempe ĉiam pligrandiĝas la armiĝo.La pliarmigado ricevis de la germana faŝismo novan grandegan antaŭenpuŝon.

3.La degenerado de la Ligo de Nacioj estas kunligata kun la degenerado de la hegemonio francia sur la eŭropa kontinento,kiu nun komencas.La demografia k ekonomia povo de Francio vidiĝis,kiel oni jam pensis,esti tro malgranda fundamento por la versajla sistemo.La ĝis al la dentoj armita francia imperiismo kun sia "defend-"karaktero restas,dum ĝi esta devigata ŝirmi la per kontraktoj legaligitajn fruktojn de siaj rabaĵoj, k anekcioj,unu el la ĉeffaktoroj de la nova milito.
Deviggata per nesufereblaj antagonismoj k per la sekvoj de la malvenko, forĵetis la germania kapitalismo la ligilon de la demokrata pacifismo k estas nun ĉefkontraŭlo de la versajla sistemo.
La grupiĝo de la ŝtatoj sur la eŭropa kontinento estas ĉefe kiel ĝis nun laŭ la principo venkintoj k malvenkintoj.
Italio aspektas kiel la nefidinda agento por en la decida momento oferti sian amikecon al la plej forta partio,kiel ĝi faris en la antaŭa milito.
Anglio provas rezervi sian sendependecon,reston de la fama"splendid isolation",esperante povi profiti el la antagonismoj en Eŭropo,la kontraŭaĵoj inter Eŭropo k Ameriko k la estiĝantaj konfliktoj en la malproksima oriento.Sed ĉiam pli malmulte feliĉigas la intencoj de la hegemonia Britio,-teruruigita pri la ruiniĝo de sia imperio,la revolucia movado en Hindio,la sensekureco de siaj pozicioj en Ĉinio,la brita imperiismo maskigas per la abomeninda ŝajnpacifismo dr Henderson la havemegan k malkuraĝan politikon de la atendado k laviado kiuj siaflanke estas unu el la ĉeffontoj de la ĝenerala sensekureco k posta katastrofo.

4.La plej grandajn ŝanĝojn kaŭzigitajn per la milita k postmilita period oni trovas ĉe Usono,en ties interna k internacia pozicioLa ega proekono-

mia superregeco permesas al la burĝaro de Usono eniri la unuan periodon post la militgo kiel "paciganto", "sirmanto de la libero de la maroj"k de la "malfermitaj pordoj". Sed la krizo en komenco k industric senmaskigis per terura forto disturbadon de la malnova ekonomia balanco,por kiu la interna merkato estis sufiĉa.Ĉi tiu vojo ne plu estas irebla.
La ekonomia supreeco de Usono kompreneble hodiaû ne estas jam forigi tute,kontraûe,relative ĝi eĉ pligrandiĝis per la ekonomia ruiniĝo de Eûropo,sed la malnovaj formoj per kiuj ĉi tiu supereco aperi- industriteknikc,komercbilanco,neŝancelanta dolaro,debeto de Eûropo) senefikiĝis.La alta tekniko ne trovas aplikon,la bilanco estas malbona,la dolaro malvaloriĝis k la debetoj ne estas pagataj.La supereco de Usono devas trovi novajn esprimojn - planigi la vojon nur povas la milito.
La parolo pri la "malfermita pordo"en Ĉinio estas senefika kontraû kelkaj japaniaj divizionoj.Vaŝington intencas en sia malproksimorient politiko esti en la plej bona momento preta estigi militon inter Sovetio k Japanio,malfortigi kaj Sovetion kaj Japanion k plani siajn strategiajn agojn laû la militfino.Dum ili laû la restadleĝo daûrigas la diskutojn pri la liberigo al la Filipinoj,provas la amerikaj kapitalistoj envere havigi al si en Ĉinio teritorion k post tio okaze de konflikto kun Anglio plivivigi la problemon pri la liberigo al Hindio.
La kapitalismo de Usono atingis jam freskaû la faktorojn kiuj devigis en 1914 Germanion sur la "militvojeton".Ĉu la tero jam estas disdonita?Oni disdonu ĝin denove!Estas ŝajne tasko de Usono organizi la mondon.La historio devigas la homaron al la eksplodo de la kapitalismo

5.La malfruigita japania kapitalismo,sin nutrigante per la sukoj de la malprogresevo,la malriĉeco k la barbareco,estas devigata per neto-lereblaj malfortoj k fiaĵoj sur la vojon de la neĝaltigantaj ŝtel-"anektadoj".La manko de propra industria bazo k la terura malforteco de la tuta japania sociordo farigas la japanian kapitalismon al la pl. agresiva k senbrida de ĉiuj.Sed la estonto montros ke malantaû ĉi tiu agresivo staras nur malmultaj realaj fortoj.Japanio ja povas doni la signalon por la milito.Sed el la duonfaûda Japanio kiun disigas ĉiuj antagonismoj jam konataj el la carisma Rusio,povas ankaû eksoni la signalo por la revolucio pli frue ol el la aliaj landoj.

6.Tamen estus tre spekulative,jam nun diveni,de kie k kiam oni unue pafos.Estas eble ke unue Japanio ne estos tre rimarkata pro la usona-sovetio interkomprenó k pro la internaj malfacilaĵoj.Sed la samaj kaŭzoj ankaû povas instigi la japanian kamarilon kiel eble plej rapide komenci,antaû ol estas tro malfrue.Ĉu la francia registaro sin decidos al "preventa"milito,kiu finos en ĝenerala masakro? Aû ĉu Francio atendos k sub la premo de Anglio interkompreniĝos kun Hitler por per tio lin malbarikadante la vojon al la oriento?
Ĉu ree elkmilitonto estos la balkana peninsulo?(Rim.de la red.Nun, 1935,ŝajnas ja Abisenio esti tiu kiu...)Aû ĉu iufoje la danubaj landoj estas ... la iniciatantoj?La multeco de la faktoroj k la interligeco de la malamikoj malebligas konkretan prognozon.Sed la ĝenerala evolutendenco estas tute klara - la postmilita tempo fariĝis al nura paûzo inter du militoj k la paûzo antaû niaj okuloj finiĝas.La plana, korporacia aû ŝtata kapitalismo,interligata kun la aûtoritateca,faŝisma aû bonaparta ŝtato,estas utopio k mensogo,se ĝi promesas kiel oficialan celon la harmonian popoloekonomion,sur la fundamento de la privata propraĵo.Sed ĝi estas minacanta realeco se ĝi estas necesa ... kunigi la ekonomiajn fortojn de la nacio por la preparo al nova milito.Nun estas tiel.Nova granda milito jam estas proksima.Ĝi estos ... kruela,pli detruanta,ol ĉiuj siaj antaûuloj.La konduto je la nova milito do estas la centra problemo de la prolota politiko.
SOVETIO K LA IMPERIISMA MILITO.
... historia mezuro mezurata,estas la kontrasto inter Sovetio k la kapitalismaj landoj nekompareble pli granda ol la antagonismoj inter ... kapitalismaj landoj mem.

Sed la klasa antagcnismc inter la labcrista Ŝtatc k la Ŝtatcj de la kapitalc aliigas sian akrecon respondc al la evoluc de la labcrista Ŝtatc k la aliiĝoj de la mcndsituc. La nekredebla evoluc de la sovetburckratismc k la malbcnaj vivkcndiĉoj de la laboristoj treege malaltigis la altirpcvon de la USSR por la labcristoj en tutmcndo. La grandaj malvenkoj de la Kcminterno k la naciisma-pacifisma eksterlanda politikc de la sovetregistarc siaflanke devis mildigi la zorgcjn de la tutmcnda burĝaro. Fine devigas la plej nova pliakrigo de la internaj antagcnismcj de la kapitalisma mondc la registarojn de Eŭropo k Usono, en la nuna etapo interrilati kun Sovetio ne el la vidpunkto de la principa problemc "kapitalismc aŭ socialismo" sed el tiu de la konjunktura rolc de la soveta Ŝtatc en la batalc de la imperialismaj fortoj. Esprimo por ĉi tiu mondsituo estis la ne-atak-kontraktoj, la agnosko al Sovetio de la usona registaro ktp. La konstantaj klopodoj de Hitler, rajtigi la pliarmigon de Germanio per la parolado pri la "danĝero en la oriento" ankoraŭ ne trovis adeptojn, speciale ne ĉe Francio k ties satelitoj, pro tio ke la revolucia danĝero de la komunismo malgraŭ la terura krizo estas perdinta sian akron. La diplomatiaj sukcesoj de Sovetio tiel klariĝas – minimume duone – el la treega malfortigo de la tutmonda revolucio.

8. Sed estus danĝera eraro kredi, ke oni tute ne plu intencas fari milititintervencion kontraŭ Sovetio. Malgraŭ ke plimildiĝis la konjunktura akro de la interrilatoj, plene restis la kontrasto de la sociaj ordoj. La neretenebla ruiniĝo de la kapitalismo devigos la burĝajn registarojn al la vojo de radikalaj solvoj. Ĉiu granda milito fariĝos, sendepende de la originaj motivoj, nova kaŭzo por ree pritrakti la militintervencion en Sovetion kun la celo transfuzi novan sangon en la sklerozitajn arteriojn de la kapitalismo.

La nekontestebla k tre profunda burokrata misevoluo de la soveta Ŝtat k la naciisma-konservativa karaktero de ĝia eksterlanda politiko ne ŝanĝas la socialan naturon de Sovetio kiel la unua laborista ŝtato. Ĉia demokrateca, idealisma, ultramaldekstra, anarkista teorio kiu neas la en la tendenco socialisman karakteron de la sovetiaj propraĵrilatoj k neagnoskas la klasan diferencon inter Sovetio k la burĝaj ŝtatoj devas nepre, speciale en milito, gvidi al kontraŭrevoluciaj politikaj konkludoj.

La defendo al Sovetio kontraŭ la atakoj de la kapitalistaj kontraŭuloj estas – sendepende de la cirkonstancoj k direktaj kaŭzoj de la atako – elementa k nepra devo de ĉiu honesta laborista organizo.

LA "NACIA DEFENDO".

9. Kiel klasikan arenon en la batalo kontraŭ la mezepoka partikularismo estigis la kapitalismo la nacian ŝtaton. Sed apenaŭ ĝuste estigita, ĝi jam komencis fariĝi bremzo por la ekonomia k kultura evoluo. El la antagonismo inter produktivfortoj k la kadro de la nacia ŝtato, kune kun la fundamenta antagonismo – inter la produktivaj fortoj k la privata posedo je la produktiloj – estiĝis la krizo de la kapitalismo kiel socia ordo.

10. Se estus ebla, en unu fojo forigi ĉiujn ŝtatajn limojn, povus la produktivfortoj ankaŭ sub la kapitalismo dum certa periodo pliaItiĝi – sed je la prezo de teruraj viktimoj – al pli alta nivelo. Ĉe forigo de la privata posedo je la produktiloj povas la porduktivfortoj – kiel montras la spertoj de Sovetio – eĉ en la ka dro de unu sola ŝtato pliboniĝi. Sed nur la forigo k de la privata posedo je la produktiloj k de la ŝtatlimoj inter la nacioj povas estigi la premisojn por la nova socia ordoekonomia – la socialisma socio.

11. La defendo al la nacia ŝtato estas, precipe en la balkanecigita Eŭropo, ties hejmo, en la tuta senco de la vorto reakciaĵo. La nacia ŝtato kun siaj limoj, pasportoj, monsistemoj, doganejoj, k armeoj por defendi la doganojn estas fariĝinta al terura baro sur la vojo de la kultura k ekonomia evoluo de la homaro. Tasko de la proletaro ne estas la defendo al la nacia ŝtato sed ties tuteca k definitiva forigo.

12. Se la nacia ŝtato estus progresa faktoro, oni devus ĝin defendi sendepende de la politikaj formoj k speciale tute sendepende de la demando, kiu kiel unua "komencis" la militon. (Daŭrigota)

## LA POPOLFRONTO EN FRANCIO.

Ni vidis en la lastaj jaroj ke oni starigas la faŝisman diktatorecon en unu lando post la alia. Tio ne estas hazardo ĉar la faŝismo estas unu el la lastaj rimedoj kiujn povas apliki la kapitalistoj por subpremi la laboristojn. Ĝi ja estas la sola rimedo per kiu oni povas savi la profiton en la nuna ruiniĝperiodo de la kapitalismo. Vivkondiĉo por la kapitalismo estas ekspansio, novaj merkatoj por la konstante kreskanta varkvanto, novaj necivilizitaj landoj por investi kapitalon por profiti, sed nun oni devas ĉesi tion. La konkurencbataloj inter la diversaj entreprenoj k ŝtatoj, kiuj volas sin reciproke ekskludi per doganmuroj, pliakriĝas, la popolo ne havas monon por aĉeti varojn k por savi la profiton oni aplikas faŝistajn metodojn. Tio ne estas sekvo de la malbona karaktero de la kapitalistoj, sed tio estas la sola ilo por savi la kap. sistemon.

UNUECFRONTO K POPOLFRONTO.

... fariĝas deviĝa neceso por la laboristoj estigi batalpovan unuecfronton por rebati la atakojn. La unuecfronto fariĝas al popolfronto se unu aŭ pluraj burĝaj partioj aliancas kun la laboristoj. Oni diras ke popolfronto estas unuecfronto sur pli larĝa bazo sed fakte estas popolfronto k unuecfronto du diversaj aferoj. Estas la programo k politiko de la burĝaj partioj kiuj karakterizas la programon k politikon de la popolfronto. Oni devas doni al la laboristoj la iluzion ke ili fakte povus atingi ion en la kadro de la burĝa sistemo. En la programoj ili ne plu parolas pri revolucio, ili tiel donas al la laboristoj iluzion pri klaspaco anstataŭ pliakrigi la klasbatalon k gvidi ĝin al la fina venko.

LA POPOLFRONTO EN LA SAAR-DISTRIKTO.

Pli frue la komunistoj multe kontraŭbatalis la popolfronton, kiuj eĉ malhelpis kunlaboron kun la socialdemokratoj kiujn ili nomis socialfaŝistoj. Sed mallonge antaŭ la sepa mondkongreso ŝanĝis Kominterno la kurson k ne nur aprobis unuecfronton sed ankaŭ popolfronton. La unua loko kie la popolfronto ricevis praktikan signifon estis la Saar-regiono en jan. 35. Tie ĝi konsistis el reformistoj (SP), stalinistoj (KP) k katolikoj, k fariĝis granda fiasko, tiel ke nur 10% balotis por "status quo". La kaŭzo estis ke oni lasis sin tute deturni de la naciisma k kristanisma agitado de la kontraŭuloj. Oni ne batalis sur proleta bazo sed flatis al la naciistoj k katolikoj. Estas ĉiam danĝere por proleta partio ludi kun tiaj aferoj, oni tiel ... nur forigas la antagonismojn inter la klasoj k tiel drivas la popolon en la armeon de la reakcio car ĉi ties partioj ĉiam estis ekspertoj en naciisma k religiisma agitado....

LA SITUO EN FRANCIO.

Dum en la lastaj jaroj en la plej multaj landoj estis rimarkebla pliboniĝo en ekonomia rilato, estis la ekonomia situo de Francio lasttempe ĉiam mizera. Tial ekzistis tie speciale bonaj kondiĉoj por ekestiĝo de forta faŝista movado kun armitaj terorgrupoj kiuj detruis la kunvenlokojn de la laboristoj, disturbis iliajn demonstraciojn ktp. La plej grava tasko de la popolfronto estas kontraŭbatali la faŝismon. La popolfronto en Francio konsistas el stalinistoj, reformistoj k maldekstraj burĝoj (socialradikaluloj). Oni demandas tuj – kial la laboristoj faras aliancon kun burĝoj? Respondas la stalinistoj – la anoj de la socialradikaluloj estas plejparte malriĉaj etburĝoj k etkamparistoj, kiuj suferas ankaŭ sub la kapitalista ekspluatado. Ni devas alianci kun ili por estigi larĝan fronton de la ekspluatataj, ĉar la laboristoj nur povas venki en la klasbatalo se ili estas subtenataj de la ekspluatataj partoj de la meza klaso. Sed! fakte la popolfronto ne estas alianco inter la etburĝoj k laboristoj, sed inter laboristgvidantoj k la parlamentaj reprezentantoj de la socialradikala partio, kiuj tute estas en la poŝoj de la financkapitalo! Fakte baldaŭ evidentiĝis la detruantaj sekvoj de la popolfronto en la agadprogramoj de la laboristaj partioj k ties ideologio.

LA NOVAJ "KOMUNISTAJ" VIDPUNKTOJ.

Multaj homoj ankoraŭ pensas ke la stalinanoj ankoraŭ staras sur la fundamento de la internaciismo kiel antaŭbatalantoj de la fama citaĵo el la Komunista Manifesto "La laboristoj ne havas patrion". Sed tio

nun estas malnoviĝinta vidpunkto.La sepa mondkongreso postulis de la komunistoj ke ili subtenu la burĝaron en la batalo por la nacia liberigo ktp k la francia partio jam bone sukcesis ŝanĝi la kurzon.La "komunista" gvidanto Duclos parolas pri "la granda franca interpaciĝo" k la centra organo "L'Humanité"skribas la 13,de okt."Ni komunistoj volas unuigi la francan popolon ,k ĉio kio malgrandigas nian popolon k nian landon doloras al ni".Laû tio la stalinistoj ankaû sentas doloron se la franca tutlanda dek-unuo en piedpilkludo malvenkas.Fine oni legas la jenan tiradon -"Nobleco devigas!La bolŝevistoj de Francio kiuj amas sian patrionk ties grandajn tradiciojn,devas sin montri esto dignaj por la jena instruo - ĉiam fari pluon por la nacia unueco de nia kara Francio k por nia popolo!"(Al interesitaj k-doj ni sendos broŝuron kun citaĵoj - ĉi tie ni ne havas lokon por ili.)

PROGRAMO K TAKTIKO.

La komuna programo por la du lab.partioj estas tute kutima reformprogramo kiu postulas pli altajn salajrojn,senlaborecsubvenciojn,ŝtatigon de monopoloj k bankoj ktp.Malgraû ke en Francio pro la kreskanta mizero iom post iom estiĝas revolucia situo,la du lab. partioj ne faras revolucian politikon sed limigas sin postuli ke la kap.ŝtato fariĝu pli sociala..k tiel stabiligas la kapitalismon!Sed oni ne povas resanigi la kapitalismon.Nur estas unu elekto - faŝisma aû proleta diktatoreco.

Por fari balancon en la budĝeto faris Laval gravajn malpliigojn de la salajroj de la ŝtataj oficistoj,k de la subvencioj.Tio sekvigis revoluciajn batalojn de la laboristoj en Brest k Toulon.Ĉi tiu spontana evidentiĝo de la batalvolo de la amasoj ne estis subtenata de la lab.partioj,kontraûe,ili skribis ke la batalojn estas "popolaĉbruadoj".Jen ni vidas la sekvon de alianco kun la burĝoj.Oni volas esti "salonkapabla" k tial perfidas sian klaskunulojn,kies interesojn reprezenti oni estas komisiita k kiuj estas objekto de organizita buĉado flanke de la polico.

MURDISTBANDOJ K LABORISTMILICO.

La faŝistaj bandoj daûrigis siajn atakojn k provokaciojn.Tiel ekz.ĉe atako en Limoges oni mortpafis laboriston.La soc. k kom.partioj nun postulis ke oni disigu la faŝistajn bandojn.La bolŝevist-leninista grupo(niaj k-doj)agitadis por laborista milico,kiel la sola efika rimedo por eviti tiajn atakojn.Sed la du partioj kontraûis tion,dirante ke tio estas "provokacio","aventurisma" k "puĉ-"politiko.La sola,je kio ili fidis estas la armita potenco de la - kapitalista - ŝtato.

La sekvojn de tio oni ja vidis en Germanio.

LA RADIKALULOJ PERFIDAS LA MALPERMESON AL LA MURDISTBANDOJ.

La ĉefa numero en la agitado de la popola fronto estas pure parlamenta - faligi la registaron de Laval,k estigi maldekstran registaron de la popolfrontpartioj.Sed en la lasta tempo ĉe la balotoj en la parlamento multaj radikalaj delegitoj voĉdonis p o r la registaro de Laval k ties kontraûlaborista politiko,tiel ke oni vidis,sur kia malforta fundamento kuŝas la popolfronto.

Nun venis la decida baloto en la parlamento pri la malpermeso de la faŝistaj murdistbandoj.Multaj radikaluloj estis por la malpermeso k la situo de Laval estis tre malbona,sed liaj bonaj amikoj,la faŝistoj, savis la aferon per bona manovro.La faŝistoj proponis mem senarmigi siajn murdistbandojn.La soc. k kom.akceptas tion entuziasme,ili proponas mem disigi siajn proprajn armeecajn organizojn(kiujn ili devigitaj de la popolopinio devis estigi)se la faŝistoj faros la samon. Sub granda partriotisma entuziasmo oni nun akceptis proponon faritan de la faŝistoj pri malpermeso havi armilojn ktp.Laval ree estis savita.

ĈU LA MALPERMESOJ ESTAS VENKO DE LA POPOLFRONTO?

Ĉi tiuj leĝoj malpermesas armitajn stratdemonstraciojn,disigas organizojn kiuj havas la formon de privata militistaro ktp.Multaj eble diras"tio ja estas grandega venko de la popolfronto,nun ne plu rajtas ekzisti la faŝistaj murdistbandoj",sed kiu interpretas la leĝojn?La Juristoj de la kapitalista-burĝa ŝtato!Ili nun havas ilon por akuzi laboristojn kiuj por sia propra defendo armigas sin per batilo aû laborilo.Proletaj milicorganiuoj estos sub akra kontrolo,dum la faŝistaj "sportorganizoj" rajtas sin tumli en la stratoj.La laboristaj reprezentantoj en la parlamento do transdonis siajn kuraĝajn kamaradojn al la klaskontraûulo.Plue povas faŝista organizo,kiu ĉiam havas

bonajn rilatojn al la armeo, en la decida momento facile havigi al si armilojn, sed ĉu tio estas same facile por la laboristoj?

KION INSTRUAS LA HISTORIO?

La fabrikokupacio en Italio 1920 ne gvidis al estiĝo de soveta respubliko ĉar ne ekzistis revolucia partio kiu povus gvidi la batalon de la lab. La sindikatestroj estis perfiduloj kiuj traktadis kun la registaro k sukcesis ĉesi la akcionon sen ke la laboristoj estis atingintaj ion. Ĉi tiuj malvenkoj helpis al la faŝistoj, la atakoj al laboristoj plimultiĝis. La ŝirmgrupoj de la laboristoj estis forigataj de la lab. partio kiu mem faris packontrakton kun la faŝistoj. Tiel oni senarmigis la laboristojn dum la faŝistoj kiuj ne sentis sin ligitaj de la kontrakto, ricevis agadliberon.

En Germanio disigis Brüning la S.A.-on, sed ĝi tamen daŭrigis kiel kutime siajn manovrojn, skoladon ktp sur la ekserciplacoj de la "Reichswehr", nur sen uniformoj k sub la nomo "sportgrupo"...

POPOLFRONTREGISTARO.

La popolfrontpolitiko de la "komunistoj", kiun ili faris anstataŭ la unuecfrontpolitiko sur proleta fundamento, gvidis ankaŭ al revizio de la malnova programo de Kominterno. Kominterno nun propagandas ke necesas batali por popolfrontregistaro, kiun ili nomas "nek socialista, nek kapitalista".

Sed kio estas tia "nek socialista, nek kapitalista" registaro?

Socialista registaro estas tia en lando kie la produktiloj estas en la posedo de la tuta socio. Ĉiu alia registaro - escepte tiu sub proleta diktatoreco - kie ankoraŭ ekzistas la privata proprajrajto je la produktiloj, do estas kapitalista registaro. Oni ankaŭ ne povas diri ke sub la popolfrontregistaro estas Francio sub proleta diktatoreco, ĉar ja ne ŝanĝis la fundamenta esenco de la ŝtato. Proleta ŝtato ja nur povas fundamenti sur la sovetoj. Popolfrontregistaro do estas registaro en kapitalista sistemo, sur burĝa fundamento - do ĝi estas burĝa-kapitalista registaro!

La "komunistoj" iras nun la saman vojon kiun antaŭ longa tempo iris la socialdemokratoj, k sur kiu ĉi tiu perfidis la lab. klason.

Komprenenble la "komunistoj" volas per tia registaro provi atingi malgrandajn reformojn. Sed en la nuna ruiniĝperiodo de la kapitalismo estas neeble fari tiel grandajn reformojn kiel la socialdemokratoj faris en la komenca periodo de la kapitalismo. Sed eĉ se la popolfrontregistaro povus atingi certajn malgrandajn reformojn, ĝi ligas per sia koalicipolitiko la lab. klason al la burĝaro, k tiel oferas la historian celon de la laboristoj - la socialismon.

Ĉu do estas eble, kiel la komunistoj asertas, per tia popolfronta registaro eviti la konkeron al la potenco flanke de la faŝistoj? Ni scias ke la faŝismo elkreskas al la etburĝaro de la kap. sistemo, kiu perdas sian ekzisteblon pro la monopoloj k kapitalkoncentrado, k se la proletaro k la revolucia partio ne povas montri al ĝi la vojon antaŭen al la socialismo, kiel la bolŝevista partio en Rusio faris, fariĝas ĝia ribelo nur al ilo de la reakcio.

Popolfrontregistaro staras sub la leĝoj de la kapitalisma sistemo, la premisoj por ekestiĝo de la faŝismo do ankoraŭ ekzistas. Post iom povas popolfronta registaro seniluziigi siajn anojn, la lab. klaso senkuraĝiĝas k la seniluziigitaj elementoj fariĝas la bazo de la faŝis-

KION NI POVAS LERNI EL LA FRANCIAJ OKAZINTAĴOJ?

La franca popolfronto estas (same kiel tiu en Saarlando) provo por apliki la lozungojn de la sepa mondkongreso. Fakte estas la taktiko la sama kiel tiu kiun la socialdemokratoj aplikis en Germanio, - oni faras ĉiam pli grandajn repaŝojn por ne provoki la faŝistojn k eviti ke ili transprenu la potencon.

Germanio k Aŭstrio montris ke oni bezonas tute aliajn rimedojn por kontraŭbatali la faŝismon. La kapitalisma sistemo batalas por sia vivo, tial ĝi ne povas fari kompromisojn.

Tipe por la nova kurso de Kominterno estas cetere, ke ĝia germania sekcio (KPD) nun havas kiel sian novan lozungon - returne al Weimar! -

Kion povas popolfronta registaro fari?

Kiel ni jam skribis komence de nia artikolo, estos programo k taktiko destinataj de tio, kion la burĝaj partioj en la popolfronto povas aprobi. Ĉu tia registaro povas plialtigi la salajrojn de la laboristoj? Ne! Ĉar burĝa partio ne povas aprobi tion. Ĉu ĝi komencos la socialigon? Se oni faras grandan premon sur ĝi, ĝi eble transprenos kelkajn grandajn

Eble ĝi transprenos kelkajn grandajn entreprenojn en ŝtatan posedon por trankviligi la popolon. Sed ĝi komprenable administros la entreprenojn laŭ kapitalismaj principoj - ĉar ĝi ja estas kap. registaro en kapitalista ŝtato.
La paca starigo de la socialismo estas iluzio. Dum la kapitalistoj ankoraŭ havas la ekonomian potencon, ili estas la solaj kiuj profitas el la de la ŝtato administrataj entreprenoj. La ŝtate kontrolita kapitalismo kiun Roosevelt estigis en Usono helpis malaltigi la realsalajron de la laboristoj sen kontentigi la labordonantojn, kiuj ne deziris limigojn en la libera iniciato, la ĉefa nervo de la kapitalismo. Ankaŭ ĉiuj kiuj pensis ke la Nira-sistemo estas speco de transiro al la socialismo devis vidi ke oni ree likvidis ĝin.
LA KONSEKVENCOJ.
Estas malĝuste demandi - ĉu demokrateco, ĉu diktatoreco? La burĝa demokrateco - kiu fakte neniam estis vera demokrateco por la tuta popolo, eĉ ne demokrateco por la kapitalistoj inter si mem - estas nun kondamnita al morto.
...m, kiam oni konstante povis ekspansii la produktadon, kiam oni daŭre povis uzi novajn merkatojn ktp estis la burĝa demokrateco, laŭ sia esenco nur demagogia afero, utile por la kapitalistoj. La profiton kiun ili ĉerpis el la kolonioj, ili povis transdoni al parto de la laboristoj (laborista aristokratio, kiu fariĝis al la amasa bazo de la socialdemokratio k tiel al scjlo de la kapitalismo). Nun malgrandiĝis la profitoj, ĉar en la kolonioj estas propraj industrioj k novaj kolonioj preskaŭ ne ekzistas. Nun oni devas en Eŭropo malaltigi la salajrojn, la laborista aristokrataro, soj̃lo de la socialdemokratio, mem malriĉiĝas k ĉie ŝanceliĝas la fundamentoj de la socio kapitalisma. Por savi la restojn de la profito, ili konstante malaltigas la salajrojn de la laboristoj, sed tiel ili samtempe malfortigas la aĉetpovon de la popolo. Tio estas la fundamenta kontraŭdiro en la kapitalismo. La kapitalismo do nur povas ekzisti, kiel molosho manĝante siajn proprajn infanojn - la laboristojn. Sed la laboristoj devas kompreni sian historian taskon - neniigi la kapitalismon, antaŭ ol ĝi estas neniiginta ilin! K ĉi tie nur ekzistas unu sola rimedo -

LA PROLETA REVOLUCIO.

## ĈU SOCIALISMO KONSTRUIĜAS EN SOVETIO? (Recenzo).

K-do Lanti editis kiel unuan kajeron de la "Biblioteko de Herezulo" la broŝuron "Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?". Trarigardante la libreton oni tuj rimarkas ke ĝin ne skribis marksisto, ĉar marksisto ne nur demandas ĉ u, sed ankaŭ k i a m, k i e, k i e l k k i a m. Marksisto do devas vidi la problemon dialektike, t.e. en ĉiuj siaj konkretaj rilatoj, kaŭzoj, sekvoj, evoluoj.

KIO ESTAS SOCIALISMO?

...as en la libro tri personoj - Futer, kun kiu sin identigas Lanti, Ruper, kompartiano, k Iver, teknikisto. Jam en la unua ĉapitro oni vidas ke ili havas nenian supozeton pri la esenco de la socialismo.
Futer donas tro longan k ne tre ĝustan difinon, Ruper ne konas diferencon inter socialismo k proleta diktatoreco, dum Iver sin tute ne interesas por la esenco de la socialismo.
Socialismo estas socio-ordo en kiu la socie gravaj produktiloj estas posedataj de la tuta socio, k en kiu ĉiu ricevas tiom da vivrimedoj kiom li ellaboras. En socialismo do ne ekzistas klasoj, ankaŭ ne plu la laborista, sed aliflanke estas socialismo ne la sola senklasa socio. (Kp. Prakomunismo k pura komunismo.)

ĈU NOVAJ KLASOJ EN SOVETIO?

La verkintoj inventas kelkajn novajn "klasojn" kiuj laŭ ilia opinio ekzistas en Sovetio. Ĉu ili fakte ekzistas? (Temas pri "patriciaro", oligarkio ktp).
Jes, eble, sed nur kiel kastoj. Sed estas grava diferenco inter kasto k klaso. Klaso estas difinita per la formo k la posedo de la propraĵo. En la antika ekonomisistemo ekzistis liberuloj k sklavoj. En la feŭda ekonomisistemo ekzistis noblulo̧j k feŭdkamparistoj. En la metiista epoka ekonomisistemo estis majstroj k helpistoj, k en la kapitalista sistemo kapitalistoj k laboristoj. La klasoj do dependas nur de la propraĵo.

Ĉar en Sovetio ekzistas la ĵenaj ekonomiaj sistemoj:socialismo,komun-ismo,ĝenerala kapitalismo,ŝtatkapitalismo ktp,en certaj neprogresintaj teritorioj eble ankoraŭ pli malaltaj formoj de ekonomiaj sistemoj, povas en Sovetio nur ekzisti la ĵenaj klasoj – kapitalistoj,proletoj, mezklasuloj,k klasoj el pli malaltaj ekonomisistemoj.
Sovetio estas nek socialisma nek kapitalisma ŝtato.Ĝi estas proleta ŝtato,tio signifas ke ĝi estas iama kapitalisma ŝtato,nun ne plu reg-ata de la burĝa(kapitalista)sed de la proleta(laborista)klaso k pro la progreseco de la proleta regado jam enhavas en sia ekonomia struktu-ro sur kapitalisma bazo socialismaĵojn k komunismajn erojn,estas tial ne plu pure kapitalisma,sed ankaŭ ne pure socialisma ŝtato.
La vorto "proleta" do esprimas ĉi tie specialan formon de ekonomia strukturo k tial ankaŭ specialan formon de ŝtato.

## LA HISTORIA MISIO DE LA PROLETARO.

Laŭ Lanti estas la "dogmo" pri la historia misio de la proletaro mito, ideologio,ne havanta sciencan bazon.
...o do signifus ke oni povus starigi socialismon sen prleta diktatoro,sen proletaj partioj,ktp,ke ĉiuj laboristaj organizoj estas tute superfluaj.
Mi ne scias kial Lanti ne kredas je la historia misio de la proletaro. La proletaro ja estas la sola klaso kiu havas avantaĝon el la starigo de la socialismo kaj tial la sola revolucia klaso.

## LA MALAPERO DE LA ŜTATO EN LA SOCIALISMA SOCIO.

Laŭ la teorio marksisma malaperos iom post iom la proleta ŝtato k kun ĝi malaperos la"ŝtato" por ĉiam,se oni estas finkonstruinta la socialismon ĉar la ŝtato estas ĉiam ilo por subpremi iujn klasojn flanke de aliaj klasoj,sed en la soc.socio ne plu ekzistos klasoj, do ankaŭ ne plu ekzistos la neceso subpremi iun klason per la ŝtato. Lanti miras pri tio ke la hodiaŭa Sovetio ankoraŭ ekzistas en la formo de ŝtato;Sed tio ja estas komprenebla afero.Unue ekzistas ekstere de Sovetio ankoraŭ kapitalisma mondo,due ekzistas en Sovetio mem ankoraŭ subpremendaj klasoj.Sovetio ja estas – malgraŭ la stalinistaj asertoj ankoraŭ ne la socialisma socio.Oni ne povas konstrui la socialismon en en unu sola izolita lando.

## ĈU LA SOCIALISMO ESTAS SCIENCO?

Lanti diras,ke,se la socialismo estus scienco,ne ekzistus diversaj marksistaj skoloj,la socialistoj ne diskutus inter si,ktp,ĉar "pri reale sciencaj veroj ĉiuj fakuloj interkonsentas".Bone,sed kio estas reale sciencaj veroj?La ĉefa materialo de la sciencistoj estas hipotezoj k teorioj,same kiel ĉe la politikistoj,La fizikistoj diskutas pri problemoj kiel ekz.la relativecteorio k la strukturo de la atomoj,la matematikistoj pri la ĝusteco de la aksiomoj de la klasika eŭklida geometrio,la geologoj pri la ekzistotempo de la mondo,la biologoj pri la parenceco inter diversaj estaĵoj,la filozofoj pri materialismo k idealismo ktp.Kie oni do ne diskutas?Do la fakto ke oni diskutas en socialistaj rondoj ne estas pruvo por tio ke la socialismo ne estas sciencaĵo.
La socialismo ja ne estas izola – ĝi nur estas sekvo el la historia materialismo,kiu mem nur estas sekvo el la pritraktado dialektik-materialisma al la historio.Tial ĉiuj grandaj marksistoj estis filozofoj.La marksismo do estas origine filozofiaĵo,sciencaĵo,oni do ne miru ke la marksistoj pritraktas la socialismon science.

## LA HISTORIA MATERIALISMO.

Pri la teorio pri la hist.mat,donas Lanti malĝustan difinon.La ĝusta difino estas – "la ideologiaj manifestacioj en iu ajn socio estas sekvo el la produktadrilatoj(ekonomio)de la koncerna socio,la ekonomio do destinas la ideologion,sed la ideologio reagas sur la ekonomion"Lanti "forgesis" la duan duonon,kiu estas sufiĉe grava,el la difino(Cetere ni volas ĉi tie mencii ke la reago de la ideologio nur havas periferian karakteron,ne decidan.
Sed Lanti eĉ tute ne [illegible] la hist,mat k kontraŭargumentas jene: "Se la hipotezo estus [illegible] [illegible] unue starigi la socialismo en la evoluiĝintaj kapitalismaj landoj,ĉar la hist.mat.sekvigas la neevitebleco[n] de la socialismo.Sed la proleta diktatoreco ja starigis unue en la ne evoluiĝinta lando Sovetio.
La kaŭzo estas miskompreno flanke de Lanti.La socialismo ne povas esti starigota en evoluita lando,nek en neevoluita lando,ĉar oni tute ne povas konstrui la socialismon en unu sola izolita lando.

Ke oni tamen povis starigi la proletan diktatoreccn en la tiama Rusio bazas je tio ke la kapitalista diktatoreco en la cara Rusio estis tre malforta k ne povis elteni la sturmon de la proletaro-kamparistaro. Rusio estis: "la plej malforta ero de la kapitalista ĉeno."

2. Lanti asertas ke la ideologia superstrukturo de Germanio k aliaj faŝistaj landoj ne povas esti konsekvenco de la ekonomia bazo, kiel asertas tion la marksistaj teoriuloj.
Ankaŭ ĉi tie li eraras. Oni povas detale klarigi ĉiujn ideologiojn de Germanio k la diferencojn inter la ideologioj de Germanio k la aliaj faŝistaj ŝtatoj el la necesoj k kondiĉoj donitaj de la ekonomia strukturo en la koncernaj ŝtatoj k de la ĝenerala politika situo.

La diferencaj opinioj pri la historia materialismo estas la ĉefaj k centraj diverĝencoj inter sennaciistoj k marksistoj. La opinio de la sennaciistoj pri la nacioj, pri Esperanto, pri la "historia misio de la proletaro" ktp facile lasas sin klarigi el ĉi tiu diferenca opinio pri la historikoncepto. En la venontaj kajeroj ni ree pritraktos ĉiujn problemojn, sed pli detale.

ĈU ESTAS RUĜA FAŜISMO EN SOVETIO?

Faŝismo estas aperformo de la kapitalismo en sia degeneracia epoko. Sovetio ne plu estas kapitalisma ŝtato, sed proleta - la vorto "proleta" esprimas, kiel ni jam supre diris, specialan formon de ekonomia strukturo - do en Sovetio ne povas regi faŝismo, ankaŭ ne "ruĝa" faŝismo, ĉar ankaŭ "ruĝa" f. estas nepre ia formo de f., do de kapitalisma diktatoreco.

Faŝismo estas politika diferenco, estrata de certaj kapitalistaj grupoj, kiu havas tipe burĝan ideologion (naciismo, religiismo, militismo, ktp, multkaze ankaŭ rasismo, antisemitismo ktp), alifianke estas la plej multaj anoj de faŝismaj tendencoj ne proletoj, nek kapitalistoj, sed certa grupo de etburĝoj - la en la krizo malriĉigita parto de la meza klaso. La f. pro esas al la lab. ian nebulan "socialismon" kiu fakte ne estas socialismo sed iu primitiva kontraŭindustrialismo, la etburĝoj ja neniam staris direkte en la klasbatalo inter lab. k kap., tial ne povis evolui firman socialisman ideologion sed nur havas ian malŝatan kontraŭ la grandkapitalistoj, bone sciante ke la kap. kulpas je la krizo, sed ne konante la soc. vojon el la krizo. Pro tio ke la etburĝoj estas restaĵo de mezepokaj, antaŭkapitalismaj ekonomisistemoj, ili havas kiel idealon la mezepokajn ekonomisistemojn, k opinias ke tio estas socialismo.-Se la f. fariĝas amasa movado, ĝi estas uzata de la kap. por detrui la danĝerajn proletajn soc. organizojn per la nedanĝera organizoj de etburĝaj "socialistoj" (nedanĝera por la kap. sistemo pro tio ke oni neniam povus ree enkonduki la mezepokajn ekonomisistemojn, ĉar la produktivfortoj estas jam tro alte evoluigitaj), pligrandigi la falantan profiton, malaltigi la salajrojn ktp, entute por plifirmigi la regecon de la grandkapitalo.

El tio evidentiĝas ke neniu povas diri ke en Sovetio regas "ruĝa faŝismo". La ankoraŭ ekzistantaj partoj de la etburĝaro en Sovetio (kamparistoj) ne ludas decidantan rolon en la ŝtato. Ne ekzistas grandkapitalistoj kiuj bezonus la f. por pligrandigi siajn profitojn. La burokrataj regantoj en Sovetio certe propagandas "socialismon" kiu fakte ne estas estigebla (socialismo "en unu lando") sed ĉi tiu soc. ideologio estas tute diferenca de la kontraŭindustrialisma "socialismo" de la faŝistoj. Ankaŭ la ideologio en Sovetio, kiu havas parte burĝajn trajtojn havas ilin ne pro tio ke ekzistas en S. burĝa reĝimo sed pro tio ke la regantaj burokratoj en S. subpremas grandajn partojn de la lab. klaso.

Do ekzistas nek ideologio, nek bazo, nek kapitalisto kiu povus profiti el ĉi, en Sovetio por la faŝismo. Tial estas malĝuste diri, ke en Sovetio ekzistas "ruĝa faŝismo".

PRI LA "SOCIALISMO EN UNU LANDO".

Oficiala teorio de la Kominterno estas depost 1928 la teorio pri la "socialismo en unu lando" = eblo, konstrui la socialismon en Sovetio. Malgraŭ ke ĉiuj gravaj komunistaj teoriuloj - Marx, Engels, Lenin, Trockij - plurfoje pruvis ke neeblas konstrui la socialismon en unu sola izolita lando, ka por la konstruo de la soc. necesas la ekzisto de proleta diktatoreco en minimume kelkaj progresintaj landoj, forgesis la tuta membraro de la Kominterno depost 1928 siajn grandajn antaŭulojn k la Marks-Engels-Lenin-Instituto en Moskvo ne sensukcese

klopedis falsigi la verkojn de la famaj komunistoj.
Tamen ni ne forgesis ilin. En la "Deklaro pri neceso k principoj de nova internacio"kiu estas eldonita kiel unua programo de la Kvara internacio - Bolenfrasat fundamentas sur ĉi tiu programo - oni povas legi:"La venkinta proletaro povas konstrui la socialismon nur en tutmonda mezuro pro la internaciaj laborpartigo k kunlaboro estigitaj de la kapitalismo".
Tamen ĉi tiujn problemojn - kiuj evidentigas la malĝustecon de ĉiuj nun ekzistantaj reformismaj k stalinismaj tendencoj,- tuŝis la verkintoj tute ne en la broŝuro malgraŭ ke ili estas tre gravaj,ja, eble eĉ pli gravaj ol la donitaj faktoj,ĉar faktojn oni povas turni, falsigi,interpreti,k en tio la stalinistoj havas rutinon.(Komparu: Letero al la CK de la ĉinia kompartio,2-a kajero de La per.rev.)
La kaŭzo de la estiĝo de la teorio pri la konstruo al la socialismo en unu lando estas komprenebla la burokratiĝo,kiu mem estas la rezulto de la situo de Sovetio k de la tutmonda lab.movado.

+ + +

Ni eble iomete longe pritraktis la malbonajn flankojn de la broŝuro. Sed tion ni faris ĉar la bonaj flankoj estas evidentaj.Grava estas la fakta k tabela materialo,kiu certe al multaj stalinistoj malfermos la okulojn.

+ + +

K nun?Ni vidis,socialismon oni ne konstruis en Sovetio,ĉar oni ne povas tion.Sed negativa kritiko ne sufiĉas.El la burokrata k sekve malĝusta politiko de la du internacioj oni devas tiri la konsekvencojn.K la konsekvenco nomiĝas-

POR LA KVARA INTERNACIO!

## LA REVOLUCIA PROLETARO K LA SANKCIOJ.

Ci tiun artikolon,rezolucion de la marista sindikato en Nov-Zelando,ni ĉerpis el la organo de la nov-zelandaj bolŝevistoj.leninistoj,THE MILITANT,organo de la Fourth Internationalist Workers Party de New Zealand.

La opinio de la membroj de la unuiĝinta marista unio pri la tutmonda situacio estas la jena.
En 1914 sekvis la lab.klaso de la tuta brita imperio la vokon de siaj diversaj registaroj,helpi al ili en la milito por la ŝirmo de la rajtoj de la etaj nacioj,de la sekurigo al la demokrateco k por la ĉiama forigo de la germania imperiismo.Oni speciale akcentis la gravecon de la sekurigo al la internacia juro kontraŭ kontraktrompantoj kiel Germanio k oni diris,ke se oni permesus al Germanio fari kion ajn,oni trovus en la mondo baldaŭ nenion krom tutmondan anarkion.
Influata de sia malamo kontraŭ la tiranio de la germana militarismo, subtenis la lab.klaso siajn kapitalistajn registarojn.Sed kiam estis deklarita la milito,estis aldonitaj al la malbonoj de la germana militarismo tiuj de la brita k franca,k je la fino de la milito triumfis la brita,franca,itala k usona imperiismo,k la demokrateco estis ĉie aŭ tre malfortigita aŭ tute forigita.Tiumaniere povis la kapitalisma sistemo forigi la konfliktojn inter la du grandaj kapitalistaj potencoj,Germanio k Britio,k post la militaj profitoj postulis la diplomatio ke la profitoj ree estu tiel kiel se ne estus estinta milito,k hodiaŭ estas la tutmonda anarkio pli granda ol 1914,malgraŭ la Ligo de Nacioj.
La nuna itala-abisenia situo estas la natura konsekvenco de la eksplutado al la laborforto k de la internacia batalo je la profitoj.
...Ree oni nin alvokis per tute la samaj frazoj,nur ke la vorto faŝismo anstataŭis la "germanian militarismon"k Abisenio anstataŭis la bedaŭrindan sangantan Belgion k la Ligo de nacioj la "sanktecon de la kontraktoj" k la "ŝirpaĉon"por kiu ni oferu nian vivon,k murdu niajn klaskunulojn,por ke la eksplutanta imperiisma grupo povu venki pri alia grupo.
Ke nia opinio kontraŭdiras al la "sankta nomo de la Ligo de nacioj" ne aliigas la aferon,ĉar la L.de n.estas malgraŭ la membreco de Sovetio ankoraŭ,kio ĝi estis je sia fondo,instrumento de la regantaj imperiismaj potencoj kontraŭ la plimalfortaj,k ĝi eĉ estas treege efika rimedo por trompi la laborantajn klasojn.
Ni tial rifuzas,lasi nin miskonduki de la alvoko,batali kontraŭ la faŝismo,ĉar ni scias ke militoj inter kapitalismaj potencoj ne estas

farataj pro la formo de la registaro sed pro la profito kapitalista, k ni eĉ scias ke kiam la milito estas deklarita,ĉiuj britaj demokratecaj registaroj uzoŝ ĉiujn necesajn rimedojn por subpremi la opozicion - ili devas agi tiel - k tiel fariĝas,vidite praktike, al faŝistaj registaroj...
Ni scias ke la faŝismo ne estas tute diferença,al la britaj tradicioj fremda sistemo...
La decidoj de la nov-zelanda registaro dum la mondmilito devus forigi ĉiujn iluziojn kiuj ekzistas pri la nov-zelanda demokrateco.
Ni komprenble simpatias kun la ekspluatata popolo de Abisenio k bedaûras k la militan atakon de la faŝista registaro italia kaj la intencita dispartigo de la lando inter la britaj,usonaj k aliaj imperiismaj interesoj.Ni simpatias kun ili same kiel kun la hindiaj limtriboj,kiujn atakis nia brita aerfloto,sed ni decide asertas ke la vojo al la liberigo kaj de la abiseniaj,kaj de la mahometanaj k hindiaj amasoj ne estas tiu,kunla britia aû nov-zelanda registaro partopreni je paca disdonigo al siaj regionoj,aû je la administrado per la Ligo de nacioj aû je nacia milito kontraû la italiaj laboristaj kiuj ankoraû antaû malmultaj jaroj estis niaj "noblaj alianculoj".
Ne estas nia devo,batali kontraû la aliaj laboristoj-kamaradoj,sed alvoki ĉiujn laboristojn en ĉiuj landoj kontraûi al siaj propraj ekspluatantaj k militonpreparantaj registaroj,kun la celo,atingi la politikan potencon por la laborista klaso,estigi la komunan proprajon je la produktiloj k tiel per ĉi tiu sola ebla maniero finigi la militojn,forigante iliajn kaûzojn.
Ni tial kontraûas al ĉiuj militon preparantaj agoj de la momentaj registaroj k deklaras ke la momenta situo ne diferencas principe de tiu en 1914,k ni rifuzas,ree lasi nin trompi.Ni neniukaze transportos militmaterialojn k trupojn aû iamaniere subtenos la miltregistaron k ni alvokas ĉiujn organizojn de la laborista klaso,unuigi sin kun ni por kontraûstari al la senhonta celado per la trompaj frazoj de la Ligo de nacioj kaŝe ree igi interbatalantaj la laboristojn de mondo por ŝirmi la kapitalistajn profitojn k estonte sekuri la ekspluatadon al la laborforto.

TRA LA GAZETARO ESPERANTISTA.

Ree vizitis nin kiel kutime la bone redaktataj SEMANTO(Svisio),LAB. ESPERANTISTO(Britio),ARBEIDERESPERANTISTEN(Norvegio)k NIA BULTENO (Usono).Arbeideresperantisten enhavas bonan artikolon pri klaskonscio en la lab.esp.movado.La Semanto enhavas ĉiam bonan feljetonon,ni povas ĝin tial speciale rekomendi,cetere ĝi estas,kontraûe al la tri aliaj redaktata nur en Esperanto.
INTERNACIA LINGVO el Polio estas presita(la supraj nur estas duplikitaj) k montras tiel la bonan staton de la SAT-movado en Polio.Bedaûre ni ne povas multon legi,ĉar ĝi estas verkita ĉefe en pola lingvo. En la lasta numero estas interesa malgranda kritiko pri la Lanti-Broŝuro(Cu socialismo...)Ni ne konsentas kun la recenzinto se la opinias ke per tiaj verkoj oni nur disigas la lab.movadon k malebligas la reunuigon de la lab.esp.organizoj. Kontraûe,unueco de la lab.partioj nur havas valoron sur firma pol.fundamento,k tian oni nur povas estigi per daûra interna diskutado.Sed la stalinistaj k reformistaj burokratoj ja tute ne volas unuecon por batali,sed por ankaû estonte povi miskonduki la laboristaron.Rilate al la lab.esp.movado estas la situo iomete alia,cetere la nerva sistemo de la laboristaj esperantistoj espereble ne estas konstruita tiel delikata ke per kelkaj broŝuroj de "herezantaj"tendencoj estas minacata la unueco.
LA KOSMO estas organo de Jap.Esp.asocio.Enhavas en sia lasta numero du strangajn artikolojn.La unua pri rasismo.Ne subskribis la verkinto,ni unue miris pri tio,sed baldaû komprenis kial.Ĉar je la fino de la kajero estas malgranda notico indikanta,ke la koncerna artikolo estas verkita de "Komercista esp.unio en kunlaboro kun Germesp.as. k la (germana)mezeûropa instituto".Estas mirinde,kian sensencaĵon povas kunŝmiri tri faŝistaj organizoj kune.
La dua opinis ke ekzistas"nenia komunismo en Rusio".Ĝis nun oni ĉie en la mondo opinias ke "Rusio"ĉesis sian vivon en okt.de 1917,k ke de post tiam ekzistas sur ĝia iama loko la Unio de la soc.sovetrespublikoj.Sed eble la verkinto ankoraû ne rimarkis tion.Alia afero estas,

PERMANENTA REVOLUCIO..............KVARA KAJERO.............DEK KVARA

ĝis nun ĉiuj homoj sciis ke en Sovetio ankoraŭ ne ekzistas la komuna ekonomisistemo. ĉar ekzistas diferenco inter socialismo k komunismo p. Lenin, Ŝtato k revolucio). Certe la stalinistoj hodiaŭ diras ke S.est socialista ŝtato (kion ni kontestas dirante ke en Sovetio nun nur ekz. as proleta dikt toreco, antaŭŝtupo al la socialismo) sed la plej fervora stalinisto ne kuraĝus diri ke en Sovetio jam estas enkondukita la komuna socisistemo.

RDA REVUO estas sendependa organo eldonita en Aŭstrio. Ĝi estas tre bone redaktita, sed tute senkolora, oni eĉ preskaŭ ne rimarkas ke ĝi estas eldonita en faŝista lando.

kaŭ ARGENTINA ESPERANTISTO estas ree sendita al ni. (Ni petas ĝin k la iajn redakciojn, sendi al ni regule la gazetojn interŝanĝe).

o spacmanko ni ne povas doni la adresojn de la gazetoj, ni volonte rigas ilin al interesuloj.

## U LA TUTMONDAN GAZETARON POR LA KVARA INTERNACIO!

ERMANA- Unser Wort, organo de la Internaciaj komunistoj de Germ. (Bolŝev-stoj-leninistoj.) Trotz Alledem, org. de la marksista akciono en Svisio. ternationale Jugendinformation de IKL, (Bolschewiki-Leninisten), germana. ono.

NCA- Lutte des classes, teoria org. de la grupo bolŝevista-leninista. Vérité. organo dusemajna de la gr. b.-l.

ERLANDA- De nieuwe Fakkel, aperas dufoje semajne, org. de la Revol. soc. partio. De Rood Gardist, organo de la Leninista junulgvardio, De Arbeid. ano de la Nacia laborsekretariaro.

A- The New Militant, organo de la laborista partio en Usono. Aperas sem e. The New International, teoria monata gazeto de la partio. Young rtacus, junula organo de la Spartacus Youth League de la usona partio. THE Vanguard, duonmonata organo de la Laborista partio en Kanadio. The itant, organo de la Lab. partioj en Aŭstralio k Nov-Zelando.

VA- Bulletin de l'oppositién (Bulteno de la opozicio), organo de la mal-stra opozicio en la sovetia kompartio. Co Dalej k Wydnokrag estas la etoj de la polia sekcio de la Int. kom. ligo, Jiskra tiu de la Interna-j komunistoj de Ĉekoslovakio. Rabotschi Visti estas ukrainlingva.

LINGVA- Izquierda estas la gazeto de nia partio en Ĉilio. "La kvara ternacio" estas ĝia teoria organo. La permanenta revolucio esperantlingv ban registron, adresojn, provnumerojn ktp oni povas ricevi de ni.

## VA STALINISTA IMPERTINENCEGO:

el vi scias estas nun traktadoj inter S.A.T. k I.P.E. pri reunuiĝo de laborista esperantista movado. Ni plene subtenos la reunuiĝon, sed esta nteresa la stalinista sinteno. Ili skribis (Laŭ letero publikigita en naciulo) ke ili postulas u n u e la ekskludiĝon de la anoj de la Kvara ternacio el la komuna asocio, ĉar... "la fondo de nova internacio estas mo en nia epoko"!

in certe ne opiniis ke estas krimo fondi novan lab. internacion kiam li is ke la malnova ne plu plenumis siajn taskojn. Sed leninismo estas io n la stalinistoj nur konas laŭnome.

skismi la lab. movadon ree estas danĝera afero. Sed ni ja ne faras ĉar plaĉas al ni tiel, sed ĉar la du nunaj internacioj ne plu plenum jn taskojn, ĉar ambaŭ estas burokratiĝintaj.

formistaj burokratoj estas agentoj de la burĝaro en la laboristaro. talinistaj burokratoj nur observas la intereson de la sovetiaj buro-. Kiuj sin tute ne plu interesas por la tutmonda revolucio.

## EGIAJ KOMUNIKOJ.

venonta kajero enhavos i.a daŭrigon de "La kvara internacio k la mili- , artikolon pri la Stahanov-movado, k versajne artikolon pri semi...

antaŭe intencis eldoni la militajn tezojn k kritikon pri la sepa mond gresc de Kominterno kiel apartajn broŝurojn, sed por igi la perm. rev. interesa k aktuala, ni decidis, aperigi la koncernajn broŝurojn ... mo de daŭrigoj k post ... La perm. rev. ilin eldoni kiel apart- broŝurojn. Prezo ja antaŭmende 0,30 dkr, ja mende post apero 0,50 dkr.
DU MONON!

SENDU MONON!

SENDU MONON!